# Ministerio pri Eksteraj Aferoj malakceptas provokan kaj kalumnian deklaron de Argentino

Image not found or type unknown

**Foto: Cubaminrex**

Havano, jul 2 (RHK) La Ministerio pri Eksteraj Aferoj de la Respubliko de Kubo malakceptas la deklaron de la Prezidento de la Argentina Respubliko, kiu provas manipuli la eventojn okazintajn la 26-an de junio en Bolivio por provi pravigi sian provokan pozicion  enmiksi?an en la internajn aferojn de aliaj ?tatoj, dum ?i samtempe lokas sin tute izolita en la regiono rilate al la pu?o en Bolivio.

Denove, la argentina registaro elparolas  kalumnie, kio celas deturni la atenton de la gravaj problemoj, kiujn ?iaj politikoj generas por sia popolo kaj en sia rilato kun aliaj ?tatoj.

Fonto: Cubaminrex

# Radio Habana Cuba